(Ili ne trovas felis)…

# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 3
marto 1989

- 7 -04- 1989

## GRAVAJ ATENTINDAĴOJ

Je la 22a de aprilo 1989 okazos ĝenerala kunsido de Belga Esperanto-Federacio, de la 14a ĝis la 16a horo en la Malnova Grenmerkato 5, proksime de la Brusela borso (kie okazis la Zamenhoffesto en decembro).
Je la tagordo troviĝas i.a. grava punkto, nome la elekto de la estraro de B.E.F.
Laŭstatute la administrantoj de F.E.L. kaj de A.P.E. estas la nuraj membroj de B.E.F. Ili elektas la estraron.
Pro tio ni firme apelacias je la ĉeesto de ĉiu administranto de F.E.L. (vidu la liston de la novaj administrantoj en la protokolo de la ĝenerala kunsido je la fino de ĉi tiu "Informilo").
Ĉiu grupo sendu sian administranton ĉe F.E.L.
La administrantoj ricevos apartan invitleteron kun pliaj informoj.

Je la 20a de majo 1989 de la 10a ĝis la 17a horo okazos studotago pri grupa agado en la Esperanto-centro en Antwerpen. La projekto de tiu studotago aperos en la sekvonta "Informilo".

Je la 17a de februaro 1989 naskiĝis Simon, filo de Ite Tytgat kaj Alex Humet, frato de Matthias. Gratulojn al la familio kaj bonvenon al la nova mondcivitano.

PROTOKOLO DE LA F.E.L.-ESTRARKUNSIDO - 11A DE MARTO 1989

Ĉeestis (alfabete) : Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Edward Symoens (ES), Jos Vandebergh (JV)

1. La antaŭa protokolo estis aprobita.

2. Estraro

ID, AH, RR, ES kaj JV pretas resti en la estraro. MC kandidatiĝis por prezidanto. Hilde Vaningelgem telefonis ke ŝi deziras ankoraŭ kunlabori sed ne plu kandidatiĝas por la estraro. Jan Bovendeerd sciigis nenion sed ĉeestos posttagmeze. Marc Vanden Bempt petis specialan statuson kiel kunlaboranto.

3. Ĝenerala kunveno

La praktika laboro estas pridiskutita kaj konkretigita por posttagmeza praktika aplikado.
Nur unu grupo (Leuven) havigis sian jarraporton al la sekretario. La jarraportoj ne estos laŭtlegitaj pro la malferma tago en la Esperanto-domo kaj la sekva limigita tempo por la kunveno, sed ili estos publikigitaj en "Informilo". Ne alvenis la nomoj de la administrantoj.

Tagordo :
- antaŭvorto de la prezidanto (ID)
- financa raporto (PP)
- sekretaria raporto (MC)
- aprobo far de la ĝenerala kunveno pri
  - la raporto de la enketo (Marc Vanden Bempt)
  - la raporto pri la studotago de instruado (AH)
- adiaŭa vorto de la prezidanto (ID)
- eksigo de la estraro

Post gvidos PP
- elekto de la administrantoj kaj kooptitoj
- elekto de nova estraro
- elekto de nova prezidanto

4. B.E.F.-kunsido

Je la 22a de aprilo 1989 en Bruselo, Malnova Grenmerkato 5, proksime de la borso. Inter la 10a kaj la 12a horo : preparaj laboroj, ekde la 14a ĝis la 16a horo : ĝenerala kunveno kun i.a. elekto de la estraro. F.E.L. priparolis la statutojn de B.E.F. kaj opinias ke ĝi estas tre grava kunveno por adapti B.E.F.-n al la sanĝiĝantaj belgaj leĝaj strukturoj. Ĉar laŭstatute la administrantoj de F.E.L. kaj de A.P.E. estas la nuraj membroj de B.E.F., ni forte instigos la administrantojn al nepra ĉeesto. Pro tio ni publikigos apartan anoncon je la kovrilpaĝo de "Informilo" kaj invitos per letero la novajn administrantojn.

5. Studotago pri grupa agado

Ĉar evidentiĝis ke la nivelo de niaj klubkunvenoj ne estas kontentigaj, ID ellaboris projekton por studotago pri grupa agado. Ĝi okazos je la 20a de majo inter la 10a kaj 17a horo en la Esperanto-centro en Antwerpen.
Ni apelacias je ĉeesto de almenaŭ unu respondenculo de ĉiu klubo.

6. Enhavo de Esperanto-Panorama

Guido Van Damme havas novajn ideojn por "Esperanto-Panorama", i.a. novaj rubrikoj, pli granda litertipo, ... Pro multaj tiaj aferoj Guido, kiel redaktoro, povas mem decidi. Pri kelkaj financaj konsekvencoj, la estraro opinias pli oportuna por inviti Guido al kunveno en la aŭtuno kiam la financaj perspektivoj de 1989 estas pli klaraj.

7. Enketo de Claudo Nourmont pri personoj kiuj scipovas fari prelegvojaĝojn. Claude kolektas ĉiujn detalojn pri tiaj prelegantoj, iliaj kompetentecoj, kondiĉoj, ...

8. La estraro decidis ne partopreni la "Alternativa"-borson en Gent kiu okazos en oktobro, i.a. por ne tro riski ke Esperanto estus katalogita ĉe tro alternativaj medioj.

9. Komuna Eŭropa Esperanto-Kongreso en 1992
S-ino Triolle proponis okazigi komunan Eŭropan kongreson. Rilate tion, ES laŭtlegas leteron de S-ro Brocatelli pri laŭebla Eŭropa Kongreso en 1992. Cu en Bruselo, ĉu en Antwerpen kiu estas proklamita kultura ĉefurbo en unu de la sekvontaj jaroj ?

---

PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE F.E.L.

ANTWERPEN - 11AN DE MARTO 1989

1. ANTAŬVORTO DE LA PREZIDANTO
ID prezentas la tagordon kaj klarigas ke, okaze de la malferma tago en la Esperanto-centro, ne estos raportoj de la lokaj grupoj. Tiuj raportoj estos publikigitaj en "Informilo".
Regas ĝenerala kontenteco pri tiu malferma tago. Ĝi estas unika ŝanco por konatigi novajn homojn kun la centro.

2. FINANCA RAPORTO
PP prezentas ĝin. Montriĝas deficito de 715.292 fr. kiu estas unu dekono de la tuta havaĵo.
Gian Carlo Fighiera sugestis en Varsovio 1987 ke GCA estas tro granda risko por U.E.A. ĉar ĝi ne sufiĉe multe gajnas. F.E.L. transprenis G.C.A. je la 1a de januaro 1988, sciante pri gravaj financaj riskoj. Antaŭe U.E.A. donis multe da laboro (1/3 de la totalaj taskoj) al G.C.A. sed ekde la 1a de januaro 1988, tiu laboro preskaŭ de unu tago al la alia subite malaperis. Dum pluraj monatoj oni sukcesis akiri novajn klientojn sed nur en novembro la afero ekvilibriĝis ĉar oni ne tiel rapide gajnas klientojn ol oni perdis subite.
Post kelkaj demandoj, la bilanco 1988 kaj la buĝeto 1989 estas aprobitaj de la ĝenerala kunveno.
Poste ID komentas pri la financa situacio :
la investo por nova maŝino estis necesa ĉar ni jam en majo alfrontiĝis deficiton de 1.000.000. La maŝino jam de decembro konstante funkcias kaj ne nur por kelkaj tagoj en la semajno kiel antaŭvidita do la perspektivoj estas esperplenaj.
Ni deziras instigi vin al varbado de ne-esperantistaj klientoj. La laborrezultoj estas tre altnivelaj kaj la prezaj tre malaltaj. Ni havu fidon en la estonteco sed eblas nur paŝo post paŝo.

3. SEKRETARIA RAPORTO

# Flandra Esperanto-Ligo

vlaamse esperantobond v.z.w.

esperanto
internationale taal


KONCIZA JARRAPORTO 1988

1. ĜENERALAJ RIMARKOJ KAJ ATINGOJ

- ekde la unua de januaro 1988, F.E.L. transprenis la Grafikan Centron de U.E.A. Tio konkrete signifas ke la Flandra Esperanto-movado havas nun sian propran Esperanto-centron pri kiu ĝi respondecas.
- respondecas pri rondvojaĝoj de prelegantoj : Hilde Vaningelgem; respondecas pri la turisma servo : Iwona Kocięba.
- F.E.L. havas ankaŭ siajn donacajn kartojn; kiu ajn povas aĉeti ilin; La valoro de la donaca karto povas esti kiom ajn granda. Ili estas interŝanĝeblaj kontraŭ Esperanto-libroj, diskoj, abonoj de "Monato", ...
- ni deziras atentigi vin ke militrifuzantoj povas fari sian militservon ĉe F.E.L.
- Krome ni deziras instigi la lokajn klubojn al uzo de la materialo de F.E.L. por ilia propagando, ekz. la afiŝo, la prospektoj kun respondkarto, ...

2. MALSUKCESOJ

- la depono ĉe bibliotekoj de la libro "Kazinski venas tro malfrue" pere de la ministerio.
- la interŝanĝo kun orienteuropaj landoj kaŭze de la restrukturiĝoj tie.

3. SUKCESOJ

3.1. LIBRO-ELDONADO

F.E.L. konstatas ke ĝi havas grandajn enspezojn pro sia libro-eldonado. Okaze de la Zamenhoftago en 1988, la 15a libro estis eldonita; tiu kvanto ĉefe eldoniĝis ekde 1986. Por siaj eldonoj F.E.L. neniam apelaciis je iu ajna financa apogo; la vendado de antaŭaj propraj eldonoj ĉiam kovris la kostojn por la novaj eldonoj. La libroservo estas tre sukcesa enspezfonto. En 1988, ni eldonis 5 librojn :

- Murdo en Esperantujo - Daniel Moirand
- Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas - Manjo Austin
- Scenaro de la tria mondmilito - Władisław Biernacki (traduko de Manuel Halvelik)
- Nigra magio - Deck Dorval
- Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ - Adriaan Roland Holst

Krome, la 4a represo de la broŝuro : Socio-politieke, culturele en pedagogische waarde van het Esperanto.

3.2. NOVA PRESMAŜINO

Ĝi ekfunkciis fine de novembro. Per ĝi, F.E.L. nun povas labori je tre interesaj prezoj. La maŝino liveras altkvalitajn rezultojn. Kvankam ĝi multe kostis, la aĉeto pozitive influis la deficiton en 1988.

3.3. F.E.L.-KONGRESO EN GENT

Ĝi okazis de la 26a ĝis la 28a de aŭgusto kaj partoprenis 105 personoj. Tre bona kaj sukcesa aranĝo, multe da eĥoj en la gazetoj, sekve de tio multe da novaj kursanoj en Gent.

3.4. STUDOTAGOJ KAJ RENKONTIĜOJ

3.4.1. LEUVEN - 27.II.1988

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, F.E.L. priparolis sian liston kun konkretaj realigeblaj planoj kaj perspektivoj. La plano estas ĉiumonate denove reekzamenita, adaptita, ĝustigita kaj kompletigita pro akiritaj spertoj. Post iom da laboro per ĝi, ni povas difini kvar celojn :

- financoj
- varbado (veki la atenton de neesperantistoj)
- kursoj
- servoj (por konservi la ligojn kun personoj kiuj finis la kurson, ekz. libroservo, perado de revuoj, vojaĝservo, ...)

3.4.2. ANTWERPEN - 30.IV.1988

Okazis unu el la plej interesaj studotagoj, nome pri lingvo-instruado kun Denis Keefe.

3.4.3. ANTWERPEN - 8.X.1988

La strategia kunsido por difini la celgrupojn. En la unua parto parolis Hans Erasmus pri :

- zorga preparado por mobilizi ĉiujn Esperanto-movadojn
- delikate gvidi la tutan projekton
- utiligi evoluojn en la socio.

Li krome parolis pri sia projekto por organizi Esperanto-instruadon en lernejoj de la diversaj landoj de la Eŭropa Komunumo. La instruado estu daŭrigota per televida kurso kaj organizado de kunsido pri lingvaj problemoj kun la Eŭropa-junularparlamento. En la dua parto parolis Mirjam Smets kaj Luk Lammens pri la difino de "servo" - Esperanto estas servo - kaj pri la merkatado : kiel plibonigi - evoluo kaj tendencoj - formoj de diskonigo - eltrovi la fortojn kaj malfortojn de nia asocio.

3.4.4. ANTWERPEN - 3.XII.1988

Daŭrigo de la strategia kunsido en oktobro, sub la titolo : Kio estas la koro de nia agado ? Trovi ĝeneralan interkonsenton pri la kerna celo. Esperanto kontentigas niajn bezonojn je kontaktoj. Por la varbado ni prezentu nin kiel lingo ĉar unue oni ekinteresiĝas pri la lingvo, nur poste pri la kontaktoj. Komparu kun floro : tigo = lingvo, koro = kontakto, petaloj = servoj. Sekvis pristudo de la ekzistantaj servoj. Evidentiĝas du ĉefaj problemoj : la niveloj de la kursoj kaj de la klubkunvenoj. Por difini niajn celgrupojn estis elektita enketo ĉe la jam ekzistanta grupo por malkovri kiajn homojn ni plej facile povis atingi sen taktiko. Paul Peeraerts kaj Marc Vanden Bempt gvidas la organizadon de tiu enketo.

mc


| Frankrijklei 140<br>B-2000 Antwerpen<br>☎ (03) 234.34.00 | Kantooruren<br>Oficaj horoj<br>9-12.30-13.30-17h. | Postrekening<br>Ĝirkonto<br>000-0265338-43 | Bankrekening<br>Bankkonto<br>402-5510531-55 | BTW<br>AVI<br>419.028.122 |
|---|---|---|---|---|

4. REZULTO DE LA ENKETO

Marc Vanden Bempt distribuas la rezultojn.
Ŝajne "la esperantisto" kiun oni plej facile atingas estas homo kiu loĝas sola en ne tre luksa domo;
li (ŝi) estas tre edukita kaj konas plurajn lingvojn;
krome evidentiĝas el la enketo ke ni atingas pli junan publikon.
La celo de la enketo estis difini niajn celgrupojn.
Ni elektis por turni nin al homoj kiuj jam lernis Esperanton en la pasinteco.
Sufiĉas nun kelkaj homoj por prepari kaj difini la celgrupo(j)n uzante la rezultojn de la enketo.

5. STUDOTAGO PRI INSTRUADO

Vidu la antaŭan "Informilo".
Celoj de tiu tago estis i.a. koni la tipon de kurso, kiu estas kvalifikita instruisto, kostoj de la kursoj, ...
ĉefe temis do pri kunordigo de spertoj

La ĝenerala kunveno unuanime aprobas la enketon kaj la studotagon pri instruado.

6. LASTA VORTO DE LA PREZIDANTO IVO DURWAEL

ADIAŬAJ VORTOJ DE LA PREZIDANTO.

Indas de tempo al tempo denove starigi la demandon "KIAL NI OKUPIĜAS PRI ESPERANTO?" Zamenhof ne penadis por starigi movadon por la progreso de Esperanto. Li laboris POR AKIRI PLI SINCERAJN HOMAJN RILATOJN. Dum mia laboro por la IL mi pli kaj pli konvinkiĝis ke NUR E' NE SUFIĈAS. Ankaŭ en nia gepatra lingvo, ni multe kolizias kun aliaj homoj. La E'-movado cetere prezentas plej varian SPEKTRON DA INDIVIDUOJ, KIUJ APENAŬ SUKCESAS KUNLABORI.
Por kompreni unu la alian, oni bezonas komunan lingvon. Por kunlabori oni krome bezonas regulojn, strukturojn. Ne sufiĉas 11 homoj, kiuj povas pilkludi, por formi piedpilkteamon. PIEDPILKLUDADO OKAZAS LAŬ TRE STRIKTAJ REGULOJ, kaj ekde certa nivelo nur en ĉeesto de arbitro. Por prepari teamon por gravega maĉo, oni eĉ EKZILAS la ludantojn. Tiamaniere la ludantoj pli bone ekkonas unu la alian, fariĝas pli intimaj amikoj. Sed ili ankaŭ tiel harmoniigas la teknikon de ludado.
TIU HARMONIO EN LA LUDADO KOMPLETE MANKIS kiam mi fariĝis Esperantisto. Mi konatiĝis kun aro da ege individuemaj homoj. Ĉiu grupo en nia lando estis kvazaŭ iu aparta, sendependa ĉelo. BEF estis ankoraŭ alia unuo, kiu ne havis multe da rilatoj kun la diversaj grupoj.
Se mi nun repensas pri la UNUA ESTRARO DE FEL, mi eĉ havas la impreson ke tiuj homoj estis tre kompetentaj kaj sindediĉaj, sed NE JAM FORMIS KOHERAN GRUPON. Tio tamen iom post iom ŝanĝiĝis. Kaj kiam MI fariĝis prezidanto de FEL, mi estis vere feliĉa ke mi povis aldoniĝi al ETOSPLENA AMIKA RONDO. Ne ĉiuj restis. Mi havas konsciencriproĉojn, ĉar ŝajne mi ne sukcesis konservi por ĉiuj la etoson, kie homoj ŝatas partopreni kaj labori. Sed mi ja konstatas, ke LA HARMONIO KRESKIS EN LA LASTAJ JAROJ EN TRI DIREKTOJN. La rilatoj inter la estraro kaj la E'-centro, la rilatoj inter la estraro kaj la grupoj kaj la rilatoj inter la centro kaj la grupoj multe pli intimiĝis. Se mi spertis multe da agrablaj momentoj kaj multe da kontentigo en miaj laboroj dum la kvin pasintaj jaroj, mi ŝuldas tion al miaj kolegoj en la estraro, kiuj daŭre dividis la zorgojn kun mi, al ĉiuj engaĝitaj oficistoj en la centro, kiuj ne pensas pri laborhoroj, sed pri la avantaĝoj de ilia laboro por nia Ligo, kaj precipe al ĉiuj lokaj aktivuloj, kiuj prizorgas la bazon de niaj aktivecoj kaj kiuj havigis al mi la plej intensajn ĝuojn en la pasintaj 5 jaroj. PLEJ KOREGAN DANKON AL VI ĈIUJ.
La estraro de FEL iniciatis novan agadstrategion, sed ne finis ĝin. Same kiel sportteamo, ni bezonas pli kaj pli da reguloj kaj strukturoj por atingi pli altan nivelon. Vi pensu, ke tiuj reguloj ne estas elpensitaj pro centralizemo. Ili necesas por atingi ke ni pli kaj pli subtenu unu la alian en pli kaj pli harmonia agado. Tiun mesaĝon mi nepre ŝatus pludoni al la nova estraro.

I.D.

6. EKSIGO DE LA ESTRARO

Transprenas la gvidadon de la kunveno Paul Peeraerts. La ĝenerala asembleo unuanime dicidas malŝarĝi la estraron. Neniu grupo sendis la nomojn de siaj administrantoj al la sekretario de FEL. Sekve la ĝenerala asembleo decidas doni al la grupoj ankoraŭ la eblecon nomumi sian administranton dum la kunveno mem. La jenaj personoj estas nomumitaj:

| Grupo | Rajtas je adm. | Delegis |
|---|---|---|
| Aalst | 1 | E. D'Hondt |
| Antwerpen | 4 | I. Durwael |
| | | A. Humet |
| | | D. de Weerdt |
| | | I. Koşieba |
| Brugge | 1 | - |
| Brussel | 1 | - |
| Gent | 2 | K. Lödör |
| | | I. Lievens |
| Halle | 1 | J. Devillé |
| Kalmthout | 1 | E. Symoens |
| Knokke | 1 | - |
| Kortrijk | 2 | J. Hanssens |
| | | J.P.Allewaert |
| Leuven | 1 | C. Deseure |
| Limburg | 3 | M. Aerts |
| | | A. Claessen |
| | | J. vd.Bergh |
| Mechelen | 1 | - |
| Mortsel | 1 | - |
| St.-Niklaas | 1 | - |
| Oostende | 1 | R.Wylleman |

Al tiuj 16 administrantoj aldoniĝas laŭofice Paul Peeraerts (FEL), Jean Pierre VandenDaele (FLEJA) kaj Guido van Damme (redaktoro Esperanto Panorama).

La eksiĝinta estraro rajtas proponi la kooptadon de 6 pliaj administrantoj (unu triono de 16 + 3). Ĝi proponas Roland Rotsaert, Monique Caestecker, Jan Bovendeerd kaj Hilde van Ingelgem. La ĝenerala asembleo ankoraŭ aldonas Jules Verstraeten kaj Gilbert Cardoen. Unuanime ĉiujn tiujn administrantojn oni akceptas por la oficperiodo 1989-1990. El tiuj 25 administrantoj proponas sin kiel estraranoj Roland Rotsaert, Monique Caestecker, Jos Vandebergh, Ivo Durwael, Alex Humet kaj Edward Symoens. La administrantaro unuanime akceptas tiun ĉi estraron. Krome ĝi voĉdonas por Monique Caestecker kiel nova prezidanto ĝis la venonta jarkunsido.

---

MEMBROSTATISTIKO

| Grupo | 1985 | 1986 | 1987 | 1988 |
|---|---|---|---|---|
| Aalst | 41 | 43 | 62 | 34 |
| Antwerpen | 139 | 140 | 149 | 160 |
| Brugge | 35 | 41 | 45 | 40 |
| Brussel | 22 | 35 | 39 | 36 |
| Gent | 19 | 36 | 47 | 57 |
| Halle | 0 | 0 | 10 | 8 |
| Kalmthout | 32 | 38 | 34 | 41 |
| Knokke | 7 | 5 | 4 | 4 |
| Kortrijk | 32 | 39 | 74 | 91 |
| Leuven | 55 | 60 | 66 | 45 |
| Limburg | 47 | 47 | 91 | 65 |
| Mechelen | 7 | 17 | 18 | 20 |
| Mortsel | 22 | 20 | 21 | 21 |
| Oostende | 0 | 0 | 1 | 23 |
| St.-Niklaas | 3 | 3 | 4 | 3 |
| Wilrijk | 3 | 3 | 0 | 0 |

---

Ĉu la donitaĵoj en la organigramo de FEL estas ĝustaj?

La respondeculoj de la lokaj grupoj bv. kontroli ĉu la nomoj, adresoj, telefonnumeroj ktp. de siaj estraranoj, kiel ili aperis en Informilo n-ro 5/1988, estas ankoraŭ ĝustaj. Se ne; bonvolu averti la centron de FEL en Antverpeno pri tio antaŭ la 20a de aprilo.

esperanto
internationale taal

# Esperanto-grupo "La Konkordo" — Kortrijk

afdeling van de vlaamse esperantobond sekcio de flandra esperanto-ligo

## JARRAPORTO = AKTIVECOJ 1988

Dum la jaro 1988 sama favora vento trablovis nian grupon, kiel la antaŭajn jarojn. Jen la plej gravaj aktivecoj :

KURSO
La nova kurso tre bonsukcesis. Ni enskribis 31 kursanojn, inter ili 12 studentoj kaj 8 gejunuloj. Ĉiuj kursanoj membriĝis. Momente, la kurso daŭrigas. Ni konservis la sistemon de 2 sinsekvaj kunvenoj la saman vesperon, en la sama ejo : unu por komencantoj la alia por progresantoj.

MEMBROVARBADO
Diversaj cirkonstancoj (kurso, gazetaraj artikoloj, personaj kontakt-leteroj) stimulis decan intereson, tiele kelkaj novuloj aliĝis. Fino de februaro 89 nia membraro sumiĝis je 90.

GAZETARA SERVO
La multnombraj artikoloj verkitaj de la klubsekretario kaj aperintaj en la lokaj gazetoj, pri Esperanto kaj niaj aktivecoj, kondukis al bonega rezultato.

VIZITOJ al la "ESPERANTO-FONDAĴO"
Tre menciinda estas la senĉesaj vizitoj al la "Esperanto-Fondaĵo", de en- kaj eksterlandaj esperantistoj kaj interesuloj. Ni notis 34 vizitojn. Ne forgesu, 4-foje ni ricevis vizitojn de studentoj por konsulti, esplori, traserĉi, ... diversajn dokumentojn, pro tezo, eseo, prelego, ktp., rilate al Esperanto. Ankaŭ 9 vizitoj de simpatiantoj + kursanoj.

BIBLIOTEKO de la "ESPERANTO-FONDAĴO"
Jarfine 1988 la enhavo estas jene :
8.360 libroj -- revuoj : 9.804 jarkolektoj, de kiuj 5.654 kompletaj kaj binditaj
1.984 diversaj titoloj
Nombro de pruntedonoj : 2.157 (libroj, revuoj, dokumentoj, ...)

IMEK-KONGRESO
Okazis 5 laborkunvenoj : preparadoj de la Kongreso (25-29.07.89)

PRELEGOJ
Kvar prelegoj de eksterlandaj Esperantistoj : S-ro Denis Keefe (Usono), 2 Afrikanoj kaj Prof.Zhang Danchen (Ĉinio). Por la lasta kun akcepto en la urbdomo + urbovizito.- Dum 3 tagojn ni gastigis la 2 Afrikanojn+ vizitoj de la Esperanto-Fondaĵo kaj de la urbo.

RADIO
Elsendo de 1 intervjuon (kun la klubsekretario) ĉe la loka radio "SOLAR" (12.01)

KLUBA AGADO - - ĜENERALAĴOJ
Dum la tuta jaro ni organizis 26 kunvenojn,k.s. Kun lumbildoj (+komento) estis 1 projekcio fare de eksterlanda esperantisto.- Okazis 12 kunvenoj kun priparolado, diskutado, ankaŭ 1 distra vespero.-- Plue, ni mencias partoprenojn al diversaj kongresoj, renkontiĝoj, ktp.-- Sekcio por la gejunuloj naskiĝis.

TRADUKO TURISMA BROŜURO (pri Kortrijk)
Laŭ peto de la Urba Turisma Servo ni prizorgis la tradukon de la nova turisma broŝuro. (Antaŭe jam ekzistis kromfolia Esperanto-versio).

11.03.89 - JH

Aangesloten bij en erkend door de Kulturele Raad van de Stad Kortrijk
Sekretariaat en korrespondentie Meiweg 23 - 8500 Kortrijk Tel. 056/21.31.06
Bankrekening Bankkonto 001-1360214-59

Agado ESPERANTO 2000 vzw dum 1988

- kurso por komencantoj '87/88 : 7 lecionoj en 1988 + ekzameno (2.3.88). Finis 3 kursanoj. Gvidis Luc Rijnders.
- finiĝis la kursoj en Paridaens Leuven kaj Tienen, 87/88. Feria kunveno kun 14 lernantinoj ĉe Helga kaj Joris 21.4.88.
- Informvespero pri Esperanto, 21 partoprenantoj (el kiuj 14 ne-Esperantistoj), 19.10.1988 ; post sufiĉe granda informkampanjo (± 8000 faldfolioj, 100 afiŝoj, kelkaj gazetartikoloj)
- almenaŭ 44 individuaj informpetoj estis persone kaj detale responditaj, kun informbroŝuroj
- lerneja prezentado de la lecionoj Esperanto 88/89, en Paridaens Leuven, 30.4.88. Aranĝis Helga Vanderbiest
- informvespero en Halle, 1.9.88 (MV)
- semajnfina rapidkurso 22 + 23.10.1988, sukcesis ĉiuj 8 kursanoj. La prezo plialtiĝis de 500,- al 1000,-.
- kurso por komencantoj '88/89 : 8 lecionoj en 1988. Aliĝis 17 personoj (kvankam la prezo plialtiĝis de 750,- al 1000,-). Gvidas Bert Boon.
- kurso en Paridaens Leuven (duajara) : 5 kursaninoj. Gvidas Joris Raeymaekers. '88/89.
- komencis skriba kursano : 1 unuajara, 0 duajaraj (! nur).
- Vesperoj 2000 : dekfoje en la jaro ; daŭra strebado al pli multaj ĉeestantoj ; meze 14,0 partoprenantoj ('86 : 10,4 ; '87 : 12,2).
- Laborvesperoj 2000 (daŭriga kurso) : 9-foje en 1988 ; meze 5,3 partoprenantoj
- 9 estrarkunvenoj en la jaro, unu ĝenerala kunveno (9.3.88)
- ĝenerala kunveno FEL marto : ĉeestas 1 reprezentanto (MV)
- Semajno de Internacia Amikeco, inaŭgura festo (10-a kaj lasta el serio !). Ĉeestas ± 100 personoj entute, 27.02.1988. Ĉeestas la urbestro, ĵurnalistoj kaj gazetfotografisto.
- Partopreno UK Rotterdam (kunordigita vizito) : 15 personoj (po unu ĝis tri tagojn)
- laborkunveno FEL pri Internacia merkatado kaj Esperanto : 8.10.1988. Ĉeestas por Eo2000 : MV.
- partopreno en kunvenoj Kultura Konsilantaro Leuven (minimume)
- revuo Esperanto 2000 regule aperis 6-foje en la jaro. Redaktis kaj administris F. Guldentops.

## JARRAPORTO 1988

La malnova estraro restis en funkcio pro manko de novaj kandidatoj.
La estraro certe 7-foje kunvenis. Manko de raportoj pri marto kaj aprilo, pro malsano de la raportisto, kaŭzas la necertecon pri la ĝusta nombro – verŝajne 9-foje.
Grupkunvenoj certe okazis 10-foje. La plej gravaj okazintaĵoj estis:

- la prezentado de la duo Klojagul;
- lumbildoj kaj komentario pri Britio;
- serĉpromeno en la urbo;
- barbekjuo en la Erka ĝardeno;
- dimanĉa promeno en Herdersem;
- novjarfesto.

1988 estis ankaŭ la jaro en kiu ni, por la unua fojo, devis pagi lumonon por nia kunvensalono. Tiu ĉi jaro ni ankaŭ organizis kurson, ne tute elementa, ĉar nur unu novulo partoprenas, kvankam la fakto ke ni dissendas 100 invitilojn al interesuloj, kiuj mem anoncis sin! La aliaj estas malnovaj membroj de antaŭaj kursoj. La lecionoj okazas en lernejo 'Vrije Handels- en Taalleergangen'. La lokalo estas senpage disponiĝita de la instituto.
La Pioniro aperis 10-foje kaj regule. La membronombro iomete malkreskis.

-----=====00000=====-----

# La Progreso – Gent

afdeling van de vlaamse esperantobond sekcio de flandra esperanto-ligo

esperanto
internationale taal

La 11an de marto 1989

## RAPORTO AKTIVECOJ 1988

La laborjaro 1988 estis vigla kaj fruktedona

Okazis: 16 estrarkunvenoj =laborkunvenoj + kunvenoj de la LKK por organizi la FEL-kongreson

7 kulturkunvenoj variaj

1 ĝenerala jarkunsido

1 informvespero (± 40 personoj )

1 serĉpromenado(± 60 partoprenantoj )

1 Zamehoffesto (± 100 partoprenantoj )

FEL-kongreso: ĝi enhavis riĉan kulturan kaj turisman programon kaj trovis eĥojn en multaj gazetartikoloj kaj radioelsendoj.

La partopreno de:la skabeno pri kulturo, Sro Bracke
la skabeno pri turismo, Sro Van Quaquebeke
kaj la guberniestro, Sro Balthazar,donis al la oficiala malfermo apartan gravecon.

Sekve de la organizo de tiu kongreso ni atingis la atenton de la publiko.
La informvespero pri Esperanto estis sukcesa.
La kurso komenciĝis kun 37 gelernantoj.
Negativajn spertojn ni ne havis dum la pasinta jaro

Rilate la enketo de FEL

Mi konstatis ke pluraj homoj pro diversaj principoj ne volis plenigi la enketilon.

Do, relative malmultnombra reago ne ĉiam estas kaŭzata pro neglektemo aŭ forgesemo.

Lödör Katja
Prezidantino.

Peter Benoitlaan 117, B-9219 Gent-Gentbrugge ☎ 091/30 16 77

Generala jarkunveno de FLEJA je dimanĉo 26a de februaro 1989 en Bruĝo okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

Ĉeestantoj: An Alberto, Desirée Derksen, Carl Deseure, Patrick Haerick, Griet Maertens, André Ruysschaert, Eddy van den Bosch, Manuel Vandenbrande, Vera Van Boxel kaj Jean Pierre VandenDaele.
Nemembroj: Filip Feys, Gerd Jacques kaj Indra Lamoot.
Senkulpigis: Stefaan Cottenier.

Komenco: 13h45.

TAGORDO

1. Enkonduko :
Gvidanto : André Ruysschaert.
Protokolanto : Jean Pierre VandenDaele.

Trarigardo de la antaŭa protokolo :
- Patrick provis eldiri la ĝeneralan sintenon de ĉiuj estraranoj rilate al Verda Konto de FEL.
- Ne estas tiel ke nur Eddy devas zorgi por ke okazu semajnfinon.

2. Jarraporto de 1988 :

2.1 11a semajnfino en Westmalle (Patrick):
la subvencioj de la flandra komunumo kovras la malgajnon. Grava rimarko estis ke komencantoj tute ne estis akompanataj. Gerd prave aldonis ke tio ankaŭ ne okazas ekster niaj kongresoj.

2.2 Financoj (Eddy):
malgajno de 40000 frankoj estis kaŭzitaj ĉefe pro malkresko de pagantaj membroj kaj pro manko de libervoluloj tiel ke ĉiu laboro estas salajre farata en GCA kaj plie la elspezoj por la revuoj JEN (preskostoj) kaj Koncize (afranko) konsiderinde kreskis. Por ŝpari afrankokostoj Koncize estos nur senditaj al tiuj kiuj pagas, al donacantoj kaj al novuloj kiuj petas ĝin. Krome Eddy esploros la kostoprezo por JEN.

2.3 JEN/Koncize (Patrick):
daŭre mankas artikoloj kaj en Koncize nur aperis aliĝilo por nia semajnfino.

3. Elektoj : (Jean Pierre)

La demisio de la malnova estraro estis unuanime akceptita.
Administrantaro nunjara unuanime elektiĝis André, Carl, Eddy, Patrick, An, Jean Pierre, Manuel, Griet kaj Vera. La estraraj taskoj dividiĝos dum nia sekvonta estrarkunveno, tamen André restos prezidanto pro manko de aliaj kandidatoj. TEJO-komitat-anoj elektiĝis la antaŭan jaron André kaj Ilse.

4. Agado 1989 :

4.1 Kursotago en Kortrijk:
La sekvontan sabaton ni denove havos dunivelan kursotagon ĉi-foje en Kortrijk. Instruantoj estos Petro de Smedt por la progresantoj kaj por novalvenantoj i.a. Patrick prezentos enkondukajn lecionojn. La lecionoj okazos inter 10 - 12aj horoj kaj 14 - 17aj horoj.

4.2 Kongresoj kaj aranĝoj al kiuj partoprenos FLEJA-anoj:
- 11/3 : FEL-jarkunveno kun malferma tago en GCA.
- 24-27/3 : semajnfino paska en Baarle-Hertog/Nassau pri Belgaĵoj kun konkurso inter NL kaj Belgio kun aliaj eksterlandanoj.
- 28-5 : serĉopromeno en Gento je la 28a de majo kie ni havos estraran kunvenon en la mateno ĉe Patrick.
- 16-23/7 : IJK-Kerkrade pri Transporto kaj poste bicikla karavano al Oostende kun daŭrigo al Britio (UK-Brighton). Por nebiciklemuloj eblos aliĝi al speco de pasporta servo (pliaj informoj ĉe Desirée), kampadi dum tendara semajno en Verviers aŭ restadi en Kortrijk kun partopreno de ekskursoj dum la medicina kongreso.
- 29/7-5/8 : UK-Brighton pri Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado
- FLEJA-semajnfino:
  ne plu eblas disponi pri la dezirata ejo en Waasmunster kaj verŝajne ankaŭ ne plu en Lokeren. Patrick certe ne plu aranĝos semajnfinon kiel li jam esprimis la antaŭan fojon. Ankaŭ ekzistas la ebleco starigi semajnfinon kun la valonaj junuloj en Verviers.

5. Diversaĵoj :

Kotizoj: novaj kotizoj subtena kaj revuaj estos decidotaj dum nia sekvonta estrarkunveno.
Dum la promena semajnfino en Verviers stariĝis nova valona junularorganizo. Ni pretas subteni ilin finance okaze de ilia ekstarto.
Ni ne plenumas al la kondiĉoj por profiti de la subtenoj financaj de Junularo por Eŭropo.
Ni akceptas la inviton de Carl por partopreni en la bieraj festoj de Gambrinus en Loveno. An kaj Vera pretas deĵori tie.
Nia sekvonta malferma estrarkunveno okazos ĉe Patrick dum la serĉpromenado en Gento. La estaranoj ricevos ĝustatempe invitilojn.

Fino: 15h45.

Uzitaj mallongigoj

| | |
|---|---|
| FLEJA | Flandra Esperantista Junulara Asocio |
| GCA | Grafika Centro de Antverpeno |
| IJK | Internacia Junulara Kongreso |
| JEN | Jongeren Esperanto-Nieuws |
| TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Kongreso |
| UK | Universala kongreso |

BELGA
ESPERANTO
FERVOJISTA
ASOCIO
BEFA

J A R R A P O R T O   D E   B E F A

1 9 8 8

Agado de BEFA depost la lasta Ĝenerala Jarkunveno de BEF

BEFA partoprenis en :

- la Zamenhofa festo de Clubo Cent en BRUSELO (12.12.87);
- la tago de la Amikeco en LOVANO (27.02.88);
- la serĉpromenado de la Genta Grupo "La Progreso" (28.05.88);
- la 40a IFEF-Kongreso de PERPIGNAN (F) de la 4a ĝis la 10a de junio 88, kaj la postkongreso de ANDORO de la 11a ĝis la 14a;
- la semajnfina arango de la Karoloreĝa Grupo en CUL-DES-SARTS (02+03.07.88);
- la fervojista tago de la 73a Universala Kongreso de ROTTERDAM (28.07.88);
- la Nordia Kunveno (DK + N + S + SF) en RY (DK) (16-18.09.88);
- la Ĝenerala Jarkunveno de FFEA (niaj frandaj kolegoj) en HOULGATE (Normandio) (23-25.09.88);
- la Ĝenerala Jarkunveno de GEFA (niaj germanaj kolegoj) en KAISERSLAUTERN (07-09.10.88);

BEFA organizis en ABERGAVENNY (Kimrujo, GB) de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto, tutsemajnan trilandan aranĝon (B - GB - NL) al kiu partoprenis 57 kongresanoj el 8 landoj.
La celo estis revigligi kelkajn landajn IFEF-sekciojn.

BEFA organizis de oktobro 87 ĝis aprilo 88 konversaciajn Esperanto-kursojn je du niveloj (komencantoj kaj progresantoj), du sabatojn po monato, en konferencejoj de la Ĝenerala Direkcio de la Belgaj Fervojoj. 25 partoprenintoj.
Ĉi-jare en oktobro, BEFA reenkondukis tiujn kursojn, sed je tri niveloj kaj 4 klasoj. 35 partoprenantoj.
La samajn sabatojn okazas posttagmeze prelegoj, konferencoj, ktp.

BEFA organizas ankaŭ perkorespondajn kursojn.

BEFA kunlaboris en la IFEF-Terminara Komisiono, kies tasko estas traduki la pli ol dekmil fakaj vortoj de la kvara eldono seslingva de la leksikono de UIC (Internacia Unio de la Fervojoj).

La 21an de novembro, la prezidanto de BEFA prelegis en la Liega Esperanto-Grupo pri TGV-trajnoj (Grandrapidaj trajnoj).

La venonta IFEF-Kongreso, la 41a, okazos en SALOU (E) de la 14a ĝis la 20a de majo 89 kun postkongreso en MAJORKO, de la 20a ĝis la 24a de majo.

Ni rememoras ke ĉiuj niaj aranĝoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj, estas ankaŭ alireblaj al ne-fervojistaj Esperantistoj.

Kompilis,
Lucien DE SUTTER,
Prezidanto de BEFA.

Bruselo, la 26an de novembro 88.




212 fr.
+ afranko

*"Amromano, kiu de realismo al surrealismo, portas nin kaj la rolulojn de mistika fantazio al kruda realeco. Ja en la karuseloj de nia vivo, per la aparta kapablo de niaj mensoj, ne estas limoj inter la fantaziaĵoj kaj la realaĵoj de niaj senso-sentoj, sintenoj kaj agadoj."*

*Gilbert R. Ledon*

***"Nur la veraj esperantistoj konas la valoron de landaj kulturoj kaj scias ilin prizorgi per tutmonda kunĝuado."***

*Sara Larbar*

| LERNIS ESPERANTON : | JES+NE | JES # | JES % | NE # | NE % | LASTAJN 10 JAROJN # | LASTAJN 10 JAROJN % | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Nombro da formularoj : | 302 | 258 | | 44 | | 175 | | |
| Meza nombro da lingvoj : | | 3.4 | | 2.8 | | 3.3 | | |
| Meza nombro da jaroj da Esp.okono | | 12. | | | | 2.6 | | |
| Meza aĝo ĉe Esp.ostudo : | | 34. | | | | 39 | | |
| Sekso : | | | | | | | | |
| ina | | 103 | 40 | 18 | 41 | 74 | 42 | |
| ula | | 154 | 60 | 26 | 59 | 100 | 57 | |
| Nuna aĝo : | | | | | | | | |
| 15-17 | | 17 | 7 | 6 | 14 | 17 | 10 | 15-34: JES 27, NE 37, L10 36 |
| 18-20 | | 8 | 3 | 3 | 7 | 7 | 4 | |
| 21-24 | | 9 | 3 | 1 | 2 | 9 | 5 | |
| 25-34 | | 36 | 14 | 6 | 14 | 30 | 17 | |
| 35-44 | | 47 | 18 | 7 | 16 | 39 | 22 | 35-64: JES 51, NE 59, L10 55 |
| 45-54 | | 44 | 17 | 9 | 20 | 33 | 19 | |
| 55-64 | | 41 | 16 | 10 | 23 | 24 | 14 | |
| 65 aŭ pli | | 55 | 21 | 2 | 5 | 16 | 9 | JES 21, NE 5, L10 9 |
| Kia loĝejo : | | | | | | | | |
| A luksa | | 16 | 6 | 5 | 11 | 11 | 6 | |
| B burĝa | | 117 | 45 | 25 | 57 | 84 | 48 | |
| C1 modesta | | 68 | 26 | 6 | 14 | 47 | 27 | |
| C2 tre modesta/luita | | 55 | 21 | 6 | 14 | 32 | 18 | |
| Membroj en familio : | | | | | | | | |
| 1 | | 35 | 14 | 2 | 5 | 17 | 10 | 14 boxed: ĉe! |
| 2 | | 76 | 29 | 15 | 34 | 37 | 21 | |
| 3 | | 30 | 12 | 3 | 7 | 26 | 15 | |
| 4 | | 65 | 25 | 11 | 25 | 51 | 29 | |
| 5 aŭ pli | | 44 | 17 | 9 | 20 | 37 | 21 | |
| Profesio : | | | | | | | | |
| kadro | | 13 | 5 | 1 | 2 | 9 | 5 | |
| oficisto | | 42 | 16 | 6 | 14 | 37 | 21 | |
| ŝtatoficisto | | 22 | 9 | 5 | 11 | 15 | 9 | |
| vendisto | | 2 | 1 | 2 | 5 | 1 | 1 | |
| agrikulturisto | | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | |
| laboristo | | 5 | 2 | 3 | 7 | 5 | 3 | |
| metiisto | | 0 | 0 | 2 | 5 | 0 | 0 | |
| dommastro | | 25 | 10 | 3 | 7 | 15 | 9 | 10 boxed: nur! |
| memstara | | 15 | 6 | 3 | 7 | 10 | 6 | |
| pensiulo | | 60 | 23 | 6 | 14 | 24 | 14 | 23 boxed: ĉe! |
| senlaborulo | | 9 | 3 | 1 | 2 | 8 | 5 | |
| instruisto lingvoj | | 10 | 4 | 2 | 5 | 8 | 5 | 4, 6, 2 boxed: ĉe! |
| instruisto io alia | | 16 | 6 | 1 | 2 | 11 | 6 | |
| instruisto ambaŭ | | 6 | 2 | 1 | 2 | 3 | 2 | |
| studento/lernanto | | 27 | 10 | 8 | 18 | 26 | 15 | |
| rentumisto | | 1 | 0 | 0 | 0 | 1 | 1 | |
| alia | | 4 | 2 | 0 | 0 | 1 | 1 | |
| Regiono : | | | | | | | | |
| agl. Bruselo | | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | |
| Flandra Brabanto | | 37 | 14 | 9 | 20 | 30 | 17 | |
| agl. Antverpeno | | 52 | 20 | 6 | 14 | 20 | 11 | |
| prov. Antverpeno | | 28 | 11 | 10 | 23 | 20 | 11 | |

(kompilinto : Marc Vanden Bempt, Leuven)



| | JES # | JES % | NE # | NE % | LASTAJN 10 JAROJN # | LASTAJN 10 JAROJN % | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| agl. Gento | 21 | 8 | 4 | 9 | 14 | 8 | |
| prov. Okc.Flandrio | 38 | 15 | 3 | 7 | 31 | 18 | |
| prov. Or.Flandrio | 55 | 21 | 9 | 20 | 40 | 23 | |
| prov. Limburgo | 19 | 7 | 2 | 5 | 17 | 10 | |
| Valonio | 4 | 2 | 0 | 0 | 3 | 2 | |
| eksterlande | 4 | 2 | 1 | 2 | 0 | 0 | |
| Lerneja edukado : | | | | | | | |
| baza | 16 | 6 | 5 | 11 | 7 | 4 | |
| baze mezgrada | 40 | 16 | 2 | 5 | 27 | 15 | |
| supere mezgrada | 61 | 24 | 12 | 27 | 37 | 21 | |
| baze teknika | 13 | 5 | 9 | 20 | 9 | 5 | |
| supere teknika | 15 | 6 | 4 | 9 | 11 | 6 | |
| supera ne-universitata | 62 | 24 | 6 | 14 | 41 | 23 | 24, 18 boxed: ĉe! |
| universitata | 46 | 18 | 5 | 11 | 38 | 22 | |
| Lingvokono : | | | | | | | |
| nederlanda | 256 | 99 | 44 | 100 | 174 | 99 | |
| franca | 221 | 86 | 31 | 70 | 144 | 82 | |
| angla | 197 | 76 | 27 | 61 | 131 | 75 | JES %: ĉe! |
| germana | 135 | 52 | 17 | 39 | 85 | 49 | |
| aliaj (nombro) | 53 | 21 | 2 | 5 | 30 | 17 | |
| lernis Esperanton : | | | | | | | |
| jes | 257 | 100 | 0 | 0 | 174 | 99 | |
| ne | 0 | 0 | 44 | 100 | 0 | 0 | |
| Parolas Esperanton : | | | | | | | |
| bone | 57 | 22 | 0 | 0 | 19 | 11 | |
| mezbone | 128 | 50 | 0 | 0 | 91 | 52 | |
| malbone | 64 | 25 | 2 | 5 | 58 | 33 | |
| Kialo por lerni Esperanton : | | | | | | | |
| lingvointeresiĝo | 114 | 44 | 2 | 5 | 77 | 44 | |
| scivolemo | 40 | 16 | 1 | 2 | 28 | 16 | |
| internacieco de Eo | 84 | 33 | 0 | 0 | 53 | 30 | |
| facileco de Eo | 41 | 16 | 0 | 0 | 29 | 17 | |
| neŭtraleco de Eo | 44 | 17 | 1 | 2 | 30 | 17 | |
| lernemo | 69 | 27 | 1 | 2 | 56 | 32 | |
| kontaktoj | 81 | 31 | 0 | 0 | 58 | 33 | |
| solvo por lingvoproblemo k.s. | 111 | 43 | 0 | 0 | 72 | 41 | |
| Ofteco de uzado : | | | | | | | |
| tage | 42 | 16 | 0 | 0 | 19 | 11 | tage + semajne: 48 |
| semajne | 82 | 32 | 0 | 0 | 63 | 36 | |
| monate | 13 | 5 | 0 | 0 | 9 | 5 | monate–neniam: 50 |
| foje | 76 | 29 | 0 | 0 | 49 | 28 | |
| neniam | 40 | 16 | 3 | 7 | 30 | 17 | |

MI INDIKIS PER 'NUR!' KAJ 'EĈ!' LA PLEJ GRAVAJN NOMBROJN.

" TRO ALTA     " ALTA

KOMPARO INTER
- PERSONOJ KIUJ LERNIS ESPERANTON (258 formularoj)
- PERSONOJ KIUJ EKLERNAS ESPERANTON (314 formularoj)

La du statistikoj ne plene koincidas, tial ni prezentas ilin aparte de la FEL-statistiko mem. Mi nur indikas procentojn.

| | | Esperanto-parolantoj | | Esperanto-studentoj | |
|---|---|---|---|---|---|
| Sekso : | | | | | |
| ina | | 40 | | 49 | |
| ula | | 60 | | 51 | |
| Nuna aĝo : | (studentoj:) | | (sume) | | (sume) |
| 15-17 | 15-17 | 7 | 7 | 4 | 4 |
| 18-20 | 18-20 | 3 | 10 | 11 | 15 |
| 21-24 | 21-25 | 3 | 13 | 24 | 39 |
| 25-34 | 26-35 | 14 | 27 | 24 | 63 |
| 35-44 | 36-45 | 18 | 45 | 20 | 83 |
| 45-54 | 46-55 | 17 | 62 | 11 | 94 |
| 55-64 | 56-65 | 16 | 78 | 6 | 100 |
| 65+ | 66+ | 21 | 99 | 0 | 100 |
| Profesio : | | | | | |
| kadro, oficisto | | 21 | | 28 | |
| ŝtatoficisto | | 9 | | 8 | |
| laboristo, agrikulturisto | | 2 | | 3 | |
| metiisto | | 0 | | 1 | |
| dommastr(in)o | | 10 | | 8 | |
| memstara, vendisto | | 7 | | 5 | |
| pensiulo | | 23 | | 3 | |
| senlaborulo | | 3 | | 2 | |
| instruisto | | 12 | | 13 | |
| studento, lernanto | | 10 | | 28 | |
| alia | | 2 | | 1 | |
| Lingvokono : | (studentoj:) | (atentu !!!) | | | |
| nederlanda | 1 | 99 | | 7 | |
| franca | 2 | 86 | | 12 | |
| angla | 3 | 76 | | 26 | |
| germana | 4 | 52 | | 37 | |
| aliaj (nombro) | 5+ | 21 | | 18 | |
| Finstudis Esperanton : | | | | | |
| % | | 100 | | ± 37 | |
| Kialo por lerni Esperanton : | | | | | |
| lingvointeresiĝo | | 44 | | 13 | |
| scivolemo | | 16 | | 15 | |
| internacieco de Eo | | 33 | | 2 | |
| facileco de Eo | | 16 | | 3 | |
| neŭtraleco de Eo | | 17 | | 2 | |
| lernemo | | 27 | | 3 | |
| kontaktoj | | 31 | | 22 | |
| solvo por lingvoproblemo ks. | | 43 | | 20 | |
| praktika valoro | | -- | | 20 | |

Konkludo : mem faru. Precipe la lasta demando estas interesa ! Atentu ke maldekstre oni rajtis indiki plurajn kialojn, dekstre nur unu. Tamen kompareblas.




KOMPARO INTER
- PERSONOJ KIUJ LERNIS ESPERANTON ( 258 formularoj)
- KARAKTERIZA SONDA PROVO de Sobemap (7876 formularoj)


La du statistikoj ne plene koincidas, tial ni prezentas ilin aparte de la FEL-statistiko mem. Mi nur indikas procentojn.


| | Esperanto-parolantoj | | Sobemap (belgoj) | |
|---|---|---|---|---|
| Sekso : | | | | |
| ina | 40 | | 51,7 | |
| ula | 60 | | 48,3 | |
| Nuna aĝo : | | (sume) | | (sume) |
| 15-17 | 7 | 7 | 6 | 6 |
| 18-20 | 3 | 10 | 6 | 12 |
| 21-24 | 3 | 13 | 8 | 20 |
| 25-34 | 14 | 27 | 18,7 | 39 |
| 35-44 | 18 | 45 | 14,7 | 53 |
| 45-54 | 17 | 62 | 15,6 | 69 |
| 55-64 | 16 | 78 | 12,9 | 82 |
| 65+ | 21 | 99 | 17,9 | 100 |
| Kia loĝejo : | | | | |
| A luksa | 6 | | 2,1 | |
| B burĝa | 45 | | 20,7 | |
| C1 modesta | 26 | | 60,5 | |
| C2 tre modesta/luita | 21 | | 16,6 | |
| Profesio : | | | | |
| kadro | 5 | | 6,3 | |
| oficisto/ŝatoficisto | 25 | | 16,9 (?) | |
| agrikulturisto | 0 | | 1,5 | |
| laboristo/ metiisto | 2 | | 13,8 (?) | |
| dommastro | 10 | | 22,6 | |
| vendisto/memstara | 7 | | 5,1 (?) | |
| pensiulo | 23 | | 16 | |
| instruisto | 12 | | ? | |
| studento, rentumisto, alia | 12 | | 11,2 | |
| senlaborulo | 3 | | 6,3 | |
| Lerneja edukado : | | | | |
| baza | 6 | | 31,5 | |
| baze mezgrada | 16 | | 16,4 | |
| supere mezgrada | 24 | | 13,8 | |
| baze teknika | 5 | | 14,3 | |
| supere teknika | 6 | | 9,0 | |
| supere ne-universitata | 24 | | 10,0 | |
| universitata | 18 | | 5,0 | |

Konkludoj : Esperanto-parolantoj estas klare pli aĝaj ol aliaj ; malmultaj dommastr(in)oj kaj laboristoj, sed multaj pensiuloj kaj instruistoj estas inter ili ; la edukada nivelo estas tre alta (meze).

Pri la loĝejo laŭ mi ne eblas konkludi : ĉu Sobemap la enketisto taksis la loĝejon, ĉu ni ne ; plie ĉu Sobemap oni ankaŭ konsideras la monatajn enspezojn en tiu kriterio ...


Personoj kiuj lernis Esperanton
lernejo edukado
bazo
bmezo
amezo
neuniv
univ


Personoj kiuj lernis Esperanton
kialoj por lerni Esperanton
interesa
scivolo
lernemo
kontaktoj


Personoj kiuj lernis Esperanton
loĝejo jes/ne-Eo parolantoj %
NE
JES
A lukso
B burĝa
C1 modesta